der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

16. Jahrgang Nr. 101 (3/1980) ISSN 0014-0619 30 Pf

De Mondpaca Esperantista Movado

Alvoko al la Esperantistaro

Ni eble travivas draman turnopunkton de la homa historio, kaj ne plu sufiĉas prikanti la pacon, nek preĝi por ties plifirmiĝo. Ankaŭ ne sufiĉas prijuĝi supraĵe la eventojn surbaze de unuflankaj informoj, al kiu ajn nacio ni apartenas, al kiu ajn relegio ni kredas, al kiu ajn filozofio ni aliĝis, ĉiu el ni alfrontas, vole nevole, gravan kaj decidan demandon: ĉu pacon aŭ militon, ĉi vivon aŭ morton sur nia planedo?

Ĉar tio, finfine, dependos de la popoloj mem.

Certe progresadis la ideoj de paca kunvivado kaj malarmado dum la lasta jardeko, sed nuntempe nuklea milito estas sur la tagordo. Kiel tio povas okazi, ĉu la mondo freneziĝas kaj kuras al sia propra pereo? Respondon ni ne trovos se ni ne provas kompreni la profundajn motivojn de tiu netolerebla situacio, kaj se ni ne forĵetas, eventuale, kelkajn antaŭjuĝojn science prizorgatajn de la militinstigantoj.

Nur naivuloj kaj malbone informitaj homoj povas imagi ke „militinstigantoj“ estas mito inventita de „komunista“ propagando. Ni memoru; ĉu **hazarde** la „okcidentaj demokratioj“ lasis strangoli la hispanan respublikon per la germana kaj itala faŝismoj? Ĉu **hazarde** ili subskribis la Munken-pakton kaj lasis Hitler invadi la tutan centran Eŭropon? Ĉu **hazarde** ili fariĝis absolutaj „pacifistoj“ fronte al la naziaj krimoj kaj minacoj? Ĉu **hazarde** ili en 1939 komencis la t. n. „strangan“ militon, kiu konsistis lasi la naziojn libere agi **orienten?**

La granda burĝaro mem donis la respondon ne kaŝante sian esperon ke Hitler liberigos ĝin de komunismo kaj likvidos la „bolŝevikan“ reĝimon. Kaj eĉ la dua fronto, dum la milito, ne malfruiĝis pro simpla hazardo aŭ ne sufiĉa preparo ... Lasi krimulojn liberaj estas instigo al krimo, ĉu ne? Kaj kia krimo, en tia cirkonstanco!

Post la dua mondmilito, la politika mapo de la terglobo multe modifiĝis. Aperis novaj socialismaj ŝtatoj. Faŝismaj reĝimoj falis. Diversaj landoj de la „Tria mondo“ elektis nekapitalisman vojon de evoluado. Kreskis la rolo de la eksterblokaj landoj, kun la aspiro liberiĝi de la sufoka premo de la plurnaciaj societoj. Nikaragvo, Irano, Afganio estas la plej freŝdataj ekzemploj de tiu evoluo, kvankam ĉiu el ili elektis sian propran vojon.

Kontraŭ tio, la imperiistoj provas reokupi ĉiapreze siajn antaŭajn poziciojn, sed devas tiucele subteni la plej sangavidajn diktatorojn, kiel ekzemple Somoza kaj la Ŝahon, kaj la plej obskurantismajn fortojn, kiel ekzemple la feŭdulojn en Afganio. Ĉiu liberiga movado, ĉiu liberiĝinta lando nepre kolizias kontraŭ la intrigoj de la imperiismo, kaj speciale kun la tro famkonata CIA. Se ĝi ne cedas, se ĝi havas normalajn rilatojn kun socialismaj landoj, ĝi estas akuzata pri koluzio[1]) kun Moskvo, kaj komenciĝas manovroj por „malstabiligi ĝin ...

Tamen la imperiismo ne plu povas trudi sian volon al la cetera mondo kiel antaŭe, sed ili trovis neatenditan aliancanon en la ĉina registaro. Tio estas tre grava kaj danĝera fakto kiu kuraĝigas la akcipitrojn de Pentagono kaj pligrandigas la riskon de nova mondmilito. La fanatikuloj de neokoloniismo volas fanatikigi la popolojn kontraŭ ĉiu lando kiu ne elektis la kapitalisman sociordon aŭ simple postulas normalajn ekonomiajn rilatojn, kiuj ne ruinigas sian popolon. La taktiko estas, i. a., akuzi la petrolposedantajn ŝtatojn pri la kapitalisma krizo, silenti aŭ mensogi pri la realigaĵoj de la „neobeemaj" landoj kaj ties politiko, prisilenti aŭ minimumigi la krimojn de la imperiismo kaj ties aliancanoj. Mensogo fariĝis ŝtata, ĉiutaga entrepreno en multaj „okcidentaj" landoj. La usona registaro trudis relanĉon de la vetarmado pretekste de necesa reekvilibro kun la milita potenco de „minacanta" Sovetunio. La propagando silentis pri tio, ke SALT 2, J. Carter mem kaj multaj aliaj agnoskis la ekziston de tia ekvilibro, kaj pri la multaj agoj kaj proponoj de Sovetunio favore al malstreĉiĝo kaj malarmado. Pri Afganio la propagando faras grandan bruon pri „enmiksiĝo" de Sovetunio en la aferojn de tiu lando, sed prisilentas la fakton, ke tion kaŭzis la propra enmiksiĝo de la imperiismo, el Pakistano, kiu murdis kaj detruis en Afganio por restarigi la obskurantismon kaj la mezepokajn privilegiojn de feŭduloj. La imperiismo respondecas pri milionoj da viroj, virinoj, infanoj mortigitaj, bruligitaj, torturitaj, vunditaj, por la tuta vivo kripligitaj, pri torentoj da larmoj kaj montaroj da ruinoj, de Eŭropo ĝis Hiroŝima, de Vjetnamio ĝis Alĝerio kaj Nikaragvo, pri la daŭra subevoluo de multegaj landoj en la Tria Mondo kaj pri la konservo de rasismaj kaj malhumanaj reĝimoj.

En preskaŭ ĉiuj strategiaj lokoj de la mondo troviĝas imperiistaj militbazoj, kiuj ne povas havi alian celon ol kontroli la ceterajn landojn kaj krei novan „sanitaran kordonon" ĉirkaŭ la socialismaj landoj kaj aliaj liberaj nacioj. Tiuj faktoj, absolute nerefuteblaj, kondukas al jena konkludo: nenio estas pli necesa ol la unuiĝo de ĉiuj porpacaj kaj progresemaj fortoj, por trudi al la imperiismo traktadon cele al malarmado kaj paca kunvivado. Nesenmotive la Papo avertis, alude al la decido de NATO, kontraŭ nuklea milito. La misiloj[2]) ĉie instalitaj kaj instalotaj, notinde en Eŭropo, ne transportas konfetojn. Neniu plu rajtas resti surdmuta. Por la honoro de la esperantista movado aperis en Japanio tre grava, korprema albumo pri Hiroŝima – Nagasaki, kun teksto en Esperanto. Bonega, teruriga „armilo", por komprenigi kio atendas nin – fakte miloble pli grave: – se la popoloj ne diras: NE PLU! Kaj denove ni turnas nin al la tuta esperantistaro kun la demando: „Ĉu vi havas nenion por diri?"

[1]) PIV: sekreta, plej ofte kondamninda, interkonsento.

[2]) raketo-tipo moderna: flugilraketoj

William Gilbert
Ĝenerala Sekretario de M. E. M.

Clara Zetkin

Lenin kaj popolaj amasoj

Kiam mi rememoras niajn konversaciojn kun Lenin – liaj vortoj restis vivaj en mi, kvazaŭ mi aŭdis ilin hodiaŭ – inter ili ĉiuj montriĝas unu karaktera trajto de la grandega revolucia gvidanto: La profundeco de lia rilato al la amasoj de laboruloj, aparte al laboristoj kaj kamparanoj. Kun kia emocio li rakontis al mi en la komenco de novembro 1920 pri kamparanaj petantoj, kiuj antaŭnelonge estis ĉe li:

„Ili estis ĉifonvestitaj, kun ĉifonoj sur la piedoj kaj en bastoŝuoj. Dum la nuna malbona vetero! Iliaj piedoj entute estis malsekiĝintaj, bluiĝintaj, frostiĝintaj. Certe, mi ordonis, ke oni alportu por ili piedvestojn el milita deponejo. Sed ĉu tio helpos? Miloj, dekmiloj da kamparanoj kaj laboristoj iradas nun kun vunditaj piedoj, neeble estas vestigi ĉiujn je la konto de la ŝtato. El kia profunda kaj terura infero devas supreniĝi, eliri nia malriĉa popolo! La vojo al ĝia liberigo estas sufiĉe malfacila, kiel la vojo de via germana proletaro. Sed mi kredas je ĝia heroeco, ĝi sukcesos!“

Lenin parolis komence mallaŭte, preskaŭ flustre. La lastan frazon li elparolis laŭte, kunpreminte la lipojn, kun la esprimo de malmola firmeco. Post kelkaj tagoj de la estado en Ivanovo-Voznesensko, proksimume dum tiu tempo, mi devus informi lin pri ricevitaj neforgeseblaj impresoj: Pri okazinta tie distrikta konferenco, pri kunvenoj en superplena teatro, kaj la ĉefa humuro tie, pri vizitado de infanĝardenoj kaj granda teksfabriko, kie laboras precipe multaj virinoj. Lenin speciale interesiĝis pri tio, kion mi vidis inter la malgrandaj infanoj kaj adoleskuloj, detale demandadis. Mi rakontis al li, kiel ĉirkaŭpaŝis min laboristinoj kaj superŝutis per demandoj pri la stato de iliaj fratinoj en Germanio, kaj ke ili diris konklude: „Rigardu niajn nudajn vunditajn piedojn. Ĉe ni nur bastoŝuoj. Malvarme, sed necesas iri por labori. Transdonu al Lenin, ke ni estos tre ĝojaj, se ni sukcesos ricevi la bonan piedveston por vintro, kaj panon oni donus por ni iom pli multe! Sed transdonu al li, ke ni eltenos sen tio, eĉ se ankoraŭ aldoniĝos plua bezono pri io“. Lenin aŭskultis kun la granda atento. Sur lia vizaĝo respeguliĝis la kompato.

„Mi scias, kiel toleras kaj suferas mankojn ĉi tiuj malriĉuloj“ li kriis. Terure, ke la Soveta potenco ne povas helpi tuj. Nia nova ŝtato dekomence devas defendi sian ekzistadon, elteni batalon. Tio postulas la multajn viktimojn. Sed mi ankaŭ scias, ke niaj proletinoj eltenos. Ili estas heroinoj, grandegaj heroinoj. Ilia liberigo ne falos por ili kiel la donaco de ĉielo. Ili meritis ĝin, ili aĉetas ĝin per siaj viktimoj, pagas kostojn per sia sango eĉ tiam, kiam ili ne staras kontraŭ la fusiloj de blankuloj.“

Lenin havis profundan komprenon pri la animaj suferoj de la homoj. Ĉi tiu rilato ne estis fondita, kiel ĉe multaj, je larmema kunsento – ĝi havis la firmajn radikojn de lia ŝatado al la popolaj amasoj, kiel historia revolucia forto.

(El „La rememoroj de eksterlandaj samtempuloj pri V. I. Lenin“, vol. 5, Moskvo 1979).

Trad. A. Smolin

I. Szerdahelyi

Lernejaj reformoj kaj Esperanto:

Hungara sperto

Prof. Szerdahelyi prilumas ĉi tie cirkonstancojn, kiuj kondukis al grava rekono de Esperanto en la kadro de la hungara eduka sistemo. Kvankam tiu rekono ne estas unika (similaj decidoj jam okazis ekz. en la baltaj sovetaj respublikoj), la rekono en Hungario verŝajne en la praktiko montriĝos la plej grava, ĉar en tiu lando jam dekon da jaroj okazas sistema oficiala edukado de kvalifikitaj instruistoj de la Internacia Lingvo. En la fono de la hungara decido sendube rolas ankaŭ la aparte intensa informa laboro, kiu okazas en tiu lando.

NI POVAS (kaj ni devas) nur ripeti la milfoje jam esprimitan tezon: la vojo al la socia plenrajtigo de Esperanto kondukas tra la lernejoj. La signo, ke iu ŝtato rekonas Esperanton, kiel kontaktan lingvon, uzeblan en internaciaj rilatoj estas, ke la ŝtato vicigas ĝin inter tiujn lingvojn, kiuj jam estas akceptitaj kiel tiaj. La fakto, ke Esperanto estas en neniu ŝtato enkadrigita en la lerneja sistemo demonstras, ke neniu ŝtato rekonis ĝis nun Esperanton, kiel plenrajtan, plenvaloran vehiklan lingvon. Dum naŭdek jaroj ĉi-terene nenio ŝanĝiĝis. Anstataŭ esplori la kaŭzojn de tiu inerteco, ni prezentas sube tiujn spertojn, kiujn ni akiris dum la lastaj ĉ. 10 jaroj en Hungario. Tiuj ĉi spertoj povas eble servi por unuj kiel sekvendaj, por aliaj eble kiel evitendaj.

La karaktero de la por-Esperanta lerneja politiko en Hungario kvalite ŝanĝiĝis per tio, ke en la lernojaro 1966/67 ekfunkciis en la Budapeŝta Universitato la fako „Esperanto: lingvo kaj literaturo". Ekde tiu tempo ŝanĝiĝis ankaŭ la problemaro de la lerneja instruado de Esperanto (sur ĉiu nivelo), ĉar ĝia scienca esploro ne plu estas afero de socia movado, sed havas oficialan, ŝtate agnoskitan institucion.

Kiam en la kadro de Hungara Scienca Akademio fondiĝis la Subkomisiono pri la Alproprigo de Fremdaj Lingvoj (apartenanta al la Laborkomisiono pri Matematika kaj Aplikata Lingvistiko de la Akademia Sekcio pri Lingvo- kaj Literatur-Scienco) kies tasko estis prilabori la perspektivan lernejan reformon por la jaro 1990, — la fakgvidanto de la universitata fako Esperanto estis invitita (23. 12. 1971) esti membro de la Subkomisiono kaj reprezenti tie la Internacian Lingvon.

Tiu fakto estas nepre emfazenda, ĉar estas neimageble, ke manke de tio la estraro de la Hungara Scienca Akademio estus invitinta iun reprezentanton de neoficiala, neŝtata, t. n. socia organizaĵo. En tiu okazo Esperanto ne estus havinta reprezentanton en la Subkomisiono.

La dua kaŭzo, kiu devigis la Laborkomisionon priatenti la Internacian Lingvon, estis, ke Esperanto (en diversaj formoj) jam estas en la lernejoj.

---

* La mallongigoj por la lingvoj signifas: A — angla, E-o — Esperanto, F — franca, G — germana, H — hispana, I — itala, L — latina, R — rusa.

Eĉ: Esperanto estas apud la grandtrafikaj (R, A, F, G) lingvoj la sola, kiu estas instruata en kelkaj bazaj lernejoj laŭ t. n. fakigita programo. Jen la skemo de tiu fakigita programo:

Lernojaro	3 a	4 a	5 a	6 a	7 a	8 a
Semajnaj studhoroj	3	3	5	5	5	5

La Laborkomisiono unue esploris la momentan situacion. En ĝia baza dokumento (La stato kaj evoluigeblecoj de la instruado de fremdaj lingvoj, majo 1974) la situacio de la fremdaj lingvoj, instruataj en la bazaj lernejoj laŭ fakigita programo estis jena:

Tabelo 1

	Lernojaro 1973/74			Lernojaro 1976/77		
Lingvo	Lernejoj	Klasoj	Lernantoj	Lernejoj	Klasoj	Lernantoj
R	232	1015,5	26 027	226	1 052	27 461
A	33	161	4 491	41	227	5 776
F	15	86,5	1 694	14	81	2 255
G	31	140	3 795	34	188	4 548
E-o	3	10	178	4	12	256

Eĉ pli favoran bildon montras la statistiko dė nedevigaj lingvokursoj:

Tabelo 2

La nedevige (fakultative) instruataj fremdaj lingvoj (1973/74) laŭ la nombro de lernantoj:

Lingvo	Baza lernejo	Mezlernejo (Gimnazio)	
		Lingvokurso	Studrondo
A	2007	1561	1679
F	289	463	643
G	8836	1290	1827
H		14	11
I	113	90	83
L	—	125	104
E-o	464	132	41
Ceteraj	—	276	126

Rim. Če la bazaj lernejoj mankas la indicoj pri la studrondoj. Al „ceteraj“ apartenas la sekvaj lingvoj: serbo-kroata, slovena, slovaka kaj rumana.

La evoluadon de Eo lerneja instruado (lernantoj) montras la suba statistiko, farita ne de la Ministerio, sed de la Lerneja Komisiono de HEA:

Tabelo 3

	Lernojaro	
	1973/74	1976/77
Bazaj lernejoj (ĉiuj formoj)	800	1696
Mezlernejoj	132	165
Universitato, altlernejoj	89	116

El la tabeloj evidentiĝas, ke en la bazaj lernejoj, apud la kvar „grandtrafikaj" lingvoj (R, A, F, G), nur Esperanto estas instruata laŭ fakigita programo (Tabelo 1), kaj kiel fakultativa studobjekto en bazaj lernejoj Esperanto estas la tria lingvo (post la G kaj A), en mezlernejoj ĝi antaŭas la italan kaj hispanan! (Tiu ĉi tre rimarkenda sukceso laŭdas la elstaran organizan/fakan laboron de la prezidantino de la Instru-Komitato de HEA, prof. Zsuzsa Barcsay).

Malgraŭ tiuj ĉi elokventaj ciferoj kaj malgraŭ ĉiuj klopodoj de la subskribinto, kiu ne ĉesis ĉiuokaze atentigi la Subkomisionon pri tiuj (kaj aliaj) faktoj, la unua konceptaĵo de la „Proponoj" ne estis favora por Esperanto. Ni citas ĉi tie parton, laŭvorte (en traduko):

„La opinio de fakuloj rilate la lernejan instruadon de Esperanto principe estas unueca, sed la publika opinio tiun ne aŭ nesufiĉe konas.

1. Esperanto havis en la periodo inter la du mondmilitoj sendube elstaran rolon en la maldekstrula movado: tre multaj per la lernado de Esperanto povis akiri plus-eblecojn por organizi la progresivajn fortojn. Sed estas dube, ĉu la estinta rolo de Esperanto en la hungara kaj internacia laborista movado estas sufiĉa motivo por ke la adeptoj de la lingvo Esperanto insistu pri ĝia lerneja instruado.

2. Oni ofte povas aŭdi, ke Esperanto povas anstataŭi la latinan lingvon, kiel fundamento de la hindeŭropaj lingvoj. Ni aŭdis tian argumentadon, ke oni komencu la fremdlingvan instruadon per Esperanto anstataŭ per la rusa.

3. Laŭ la opinio de la fakuloj oni povas ebligi la instruadon de Esperanto, kiel artefarita lingvo en eksterlernejaj kadroj (studrondoj, student-rondoj). Estas notinde, ke nek Esperanto nek la aliaj artefaritaj lingvoj havas tiajn spertojn en la aliaj socialismaj landoj aŭ en kiu ajn lando, sur kiuj oni povus bazi la lernejan instruadon de Esperanto. Krom tio, pro la jam tre malvasta fremdlingva hor-kadro, la enkonduko de Esperanto malfavore influus la instruadon de la aliaj fremdaj lingvoj.

Resume: Nuntempe, tiel el ekonomia kiel el socia vidpunktoj, ni konsideras unua tasko la instruadon de la rusa lingvo kaj dua vivanta fremda lingvo; la enkondukon de Esperanto en la lernejan instruadon provizore ni ne konsideras aktuala." (p. 53-54)

Post tiu ĉi decido la subskribinto prilaboris kontraŭ-proponon. Tiu kontraŭpropono („La morgaŭo de nia fremdlingva instruado") aperis en la oficiala revuo de la Ministerio pri Instruado, Köznevelés (Publika edukado), Budapest, 1977, 10.21, 34: 6-7. La artikolo aperis represita en la Jarlibro de la hungarlingva revuo de HEA, Világ és Nyelv (Mondo kaj lingvo). Krome, li dissendis al la membroj de la Subkomisiono cirkuleron, en kiu li prezentas la ĝisnunajn eksperimentajn rezultojn kaj detalan bibliografion pri la temo. Sekve de tiuj dokumentoj, la estraro de la Subkomisiono aranĝis kunsidon por pridiskuti la temon. Laŭ la propono de la subskribinto, estis invititaj kiel observantoj ankaŭ du membroj de la estraro de HEA. La referaĵo finiĝis per la sekvaj konkretaj proponoj:

1. Enkonduki Esperanton kiel propedeŭtikan lingvon en la 3an kaj 4an klasojn de la baza lernejo, kiel unuan fremdan lingvon;

2. Restarigi la oficialan fakan instruadon de Esperanto en la pedagogiaj altlernejoj en Esztergom, Sárospatak kaj Szombathely;

3. Ebligi la tujan komencon de eksperimenta instruado en minimume dek lernejoj, por havi eblon pruvi la hipotezojn;

4. Esperanto estu instruebla oficiale, laŭprograme, en tiuj mezlernejoj, kie disponeblas diplomitaj mezlernejaj instruistoj pri Esperanto;

5. Oni enkonduku Esperanton en tiujn faklernejojn, kie nuntempe ne okazas instruado de kiu ajn fremda lingvo (metilernejoj, lernejoj por tajpado kaj stenografio, 2-jaraj sanitaraj lernejoj k.s.). La protokolo de la kunsido jene resumas la debaton:

„En la diskuto pri la temo de lernejaj eksperimentoj pri Esperanto, prezentita de István Szerdahelyi, krom la du invititaj HEA-reprezentantoj, parolis 9 membroj de la Subkomisiono. Esperanto rajtas havi sian lokon en ĉiuj projektoj pri la evoluigo de elekteblaj lingvoj. Oni ne decidis pri tio, kiun apogon ricevu Esperanto kiel eksperimenta lingvo antaŭ la 3a klaso aŭ en la superaj klasoj de la bazlernejo. La Laborkomisiono enkadrigas en sian sciencan esplorprogramon la kolektadon de spertoj pri la instruado de Esperanto.

Dum la sama kunsido estis fondita Redakta Komisiono por finpretigi la definitivan proponon. Laŭ tiu propono, la estonta skemo de la fremdlingva instruado en la lerneja sistemo aspektos jene:

Lingvoj/Klasoj	Baza lernejo					Mezlernejo (Gimnazio)			
	4a	5a	6a	7a	8a	1a	2a	3a	4a
1a rusa	2	3	3	3	3	4	3	3	2
2a lingvo	—	—	3	5	5	2	2	—	—
3a lingvo	—	—	—	—	—	—	—	2	3

Laŭ la propono en la bazaj lernejoj la dua lingvo povas esti nur unu el la sekvaj tri lingvoj: A, F, G. En la mezlernejoj, krom la supraj, dua lingvo povas esti ankaŭ H, I, L. La tria lingvo povas esti: Esperanto kaj la klasika greka, krome, laŭ regionoj, la ĉeĥa, slovaka, pola, rumana, bulgara kaj serbokroata. El tiu propono poste sekvis la ministeria decido n-ro 22.011/1978, en kiu Esperanto rolas en la unua loko inter la lingvoj elekteblaj kiel tria fremda lingvo."

Ĉar la antaŭreformaj eksperimentoj komenciĝas tuj, la subskribinto devis dum rekorda tempo, ĝis la 15a de novembro 1978, prilabori la oficialan programon de la nova studobjekto, kaj ĝis la fino de decembro la unuan oficialan lernolibron por la 3a klaso de gimnazio.

Ambaŭ dokumentoj estas jam pretaj.

Ekestas nun la demando: Kiel taksi tiun ĉi atingon?

Ni nepre ne supertaksu ĝin, sed ankaŭ ne subtaksu. La signifo estas ĉefe kvalita, kaj nur parte kvanta. Esperanto definitive eniris en la klubon de tiuj lingvoj, kiuj estas oficiale-fakultative — sed post la elekto devige — instrueblaj en la mezlernejoj. El tio sekvas, ke altiĝis la praktika valoro de la universitata diplomo, malfermiĝis la ebleco pluevoluigi tiun universitatan institucion.

Esperanto havas siajn oficialajn dokumentojn en la arkivo de la Ministerio kaj en la ŝranko de ĉiu mezlerneja direktoro. Esperanto havos siajn oficiale kaj ŝtate eldonitajn lernolibrojn, kiuj aperos sub la samaj kondiĉoj, en la sama formo, kiel la lernolibroj por la aliaj fremdaj lingvoj. Pretiĝos diversaj instruhelpiloj (magnetofonaj bendoj, lumbildoj, filmoj k. s.), kiuj povus iom post-iom kontribui al la nivelaltigo de la instrumetodo; kolektiĝos spertoj pli konkretaj ol ĝis nun, ktp., ktp.

En la hungaraj mezlernejoj Esperanto per tio oficialiĝis. Ĝia statuso estas pli modesta ol la statuso de kelkaj aliaj lingvoj, sed gravas, ke tiu statuso ekzistas. Pri ĝia estonta realigo kaj ebla pluevoluigo respondecos la Esperantaj pedagogoj.

(El „Esperanto" 3/1979)

Prelego antaŭ lingvistoj

D-ro Till Dahlenburg prelegis la 7an de februaro 1980 antaŭ pli ol 60 profesiaj lingvistoj de la (universitatnivela) Pedagogia Altlernejo Erich Weinert en Magdeburg pri „Situacio kaj apliko de planlingvoj por la internacia komunikado, sub aparta konsidero de Esperanto".

La preleginto i. a. skizis la lokon de la planlingvoj en la lingvospektro, apriorajn kaj aposteriorajn projektojn, li karakterizis Esperanton, ties aplikosferojn kaj ĝian propedeŭtikan valoron. En la vigla diskuto oni i. a. interesiĝis prí la kapabloj de Esperanto kiel lingvo de la literaturo, lingvaj ecoj de la planlingvo (i. a. evoluado) kaj la rilato inter planlingvo kaj etnaj mondlingvoj.

La granda intereso pri la problemo, ĉiam denove konstatebla en GDR, substrekas la neceson de pli intensaj celkonsciaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj aktivecoj.

Werner Pfennig

Plibonigo de gvida laboro

1. *Kunlaborado kun la estraroj de Kulturligo; planado de financoj kaj laborplano*

La laborado de Subdistrikta Laborrondo Esperanto (SDLE) aŭ Distrikta Laborrondo Esperanto (DLE) nur estas rezultoplena, se ekzistas daŭra kontakto al la koncernaj estraroj de Kulturligo. La prezidantoj de SDLE aŭ DLE nepre estu aktive kunlaborantaj membroj en tiuj estraroj, kaj ili estu malfermaj al la problemoj de Kulturligo kaj strebu al larĝa kunlaborado kun la aliaj interesgrupoj. Grava elemento de la laborplanado estas la ĝustatempa ellaboro de ĉiujara financplano por certigi la financajn rimedojn de la esperantistoj en la kadro de la tuta Kulturligo. Bazante sin sur la jam somere de la antaŭjaro farita kaj konfirmita financplano strukturiĝas la laborplano je la lastaj monatoj por la sekvonta jaro.

Fundamento de tiu planado estu sobreco kaj realeco je la taskoj kaj celoj, krome klareco (koncizeco) en la konkretaj, plenumeblaj kaj dekalkuleblaj taskoj.

Nepre evitendaj estu tiaj aktivecoj kies financaj kaj tempaj kostoj malharmonias kun la rezultoj; tro ofte ni malŝpare fordonas forton, tempon kaj monon por aferoj, kiuj helpas nek la movadon nek la unuopulon, aŭ oni dispartiĝas en ne finpripensitajn senrezultajn aktivecetojn.

Do unue gravas koncentriĝi je la plej urĝaj kaj eminentaj celoj kaj nur post ilia sukcesa plenumo ni starigu antaŭ nin pli grandajn taskojn.

Esencaj punktoj de nia baza laboro estu:

1) organizado de regulaj kursoj kaj ebleco por kontinua kvalifikado (do kursoj por komencantoj, progresintoj, konversaciaj rondoj, intensivaj seminarioj krome korespondaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj).
2) sistema enigado de la lernintoj en la Esperanto-movadon (partoprenigo en diversaj Esperanto-aranĝoj, perado de korespondemuloj, abonigo de Esperanto-revuoj, aktivigo en internacia kampo k. t. p., k. t. p.)
3) aktiva kunlaborado kun la Kulturligo por la plenumo de kulturpolitikaj taskoj en GDR kaj eksterlando.

2. *Disdivido de la taskoj kaj ilia kontrolo; plenumado de la funkcioj*

Membro de iu estraro nur povas esti tiu, kiu kapablas memstare kaj kree plenumi konkretajn taskojn. Pasivaj membroj de la estraro, sen indulgo je iliaj iamaj prestiĝoj aŭ meritoj, liberigu la lokojn por pli talentaj kaj kapablaj estraranoj, kiuj vere laboras kontinue, lerte kaj celkonscie.

Interne de ĉiu estraro nepre regu demokratiaj principoj, daŭra, fruktodona laboro nur eblas en spirite akceptema, kamaradeca kaj harmonia atmosfero.

Tre favoras, se ekzistas bone pripensita disdivido de la funkcioj, se **ĉiu** membro de estraro ricevas **sian** konkretan dekalkuleblan taskon. Ĉiun disdonitan taskon oni kontrolu kiel oni plenumis ĝin (ĝustatempe, bonkvalite).

Ankoraŭ oftas, ke la prezidanto de iu estraro supozas, ke li ĉion sole devas fari – ĉar la aliaj ne estas „fidindaj". Sed fakte li edukis siajn estraranojn al nememstareco aŭ ĉagrenigis ilin pro tro ofta enmiksiĝo en iliajn taskojn.

La disdivido de la funkcioj tamen estu sufiĉe varia – oni sĕvere priatentu, ke la honoroficaj taskoj bone harmoniu kun la profesia laboro, la familio kaj la aliaj ŝatokupoj de la koncerna estrarano.

Grandajn rezervojn ni povus uzi, se la funkcioj plene konformas kun la inklinoj, interesoj kaj profesiaj eblecoj de la estrarano.

3. Edukado de la gvida personaro; junulara laboro

Konstanta problemo estas la edukado de estraranoj en ĉiuj ebenoj kaj kampoj. Pro tio ĉiu estraro devas kontinue zorgi pri formigo kaj kvalifikado de novaj kadruloj. Ekzemple estus bone, se por la funkcio de prezidanto de SDLE aŭ DLE prepariĝas samtempe 2 – 3 personoj, kiuj sisteme kaj longdaŭre ekkonadas ĉiuj laborojn, taskojn kaj problemojn de la eventuala prezidanteco. Pro la granda taskaro de la nuna prezidanto ofte necesas sendi anstataŭantojn al diversaj aranĝoj – tie estas ekzemple unu vasta kampo por eduki kaj esplori la kapablojn de la kadruloj.

Nur, se oni ebligas al ili memstaran kaj krean laboron – sub kamarada helpanta kontrolo – ni edukas vere talentajn fidindajn estraranojn.

La junulara laboro sur la kampo de Esperanto precipe komplikas pro tio, ĉar la ellernado de la lingvo kaj la integriĝado en la Esperanto-movadon estas longjara proceso. La gejunuloj post fino de lerneja tempo, lernas profesion, armedeĵoras, studas, geedziĝas – ĉiam aŭ ofte ŝanĝante la loĝlokon.

El tio rezultas, ke DLR kaj SDLE havas jenajn taskojn:

– seninterrompa kontakto al la gejunuloj per informiloj, invitoj al aranĝoj k. t. p.
– perado de adresoj de la rondoj en iliaj novaj loĝlokoj
– la koncernaj rondoj (estraroj) devas siaflanke serĉi la rilaton al tiuj gejunuloj por plej rapide aktivigi ilin.

Por garantii sufiĉe bonan stabilecon en la junularaj estraroj (Junulara Aktivo de DLE) oni havu larĝan gvidan ebenon, en kiu la junuloj laŭeble ne nur estu samaĝaj. Tio gravas, por ke ne la tuta estraro samtempe forlasu sian postenon por ekz. eklerni siajn profesiojn (en alia urbo).

En alia kazo ĉiam restas trunko de la estraro el kiu facile formiĝas nova estraro.

4. Publika laboro, propagando

Por ke estu kontinua alfluo de membroj tre gravas la publika laboro.

4.1. Nealtruda ĝenerala informado:

Regule kaj sisteme oni informas (ne varbas!) pri konkretaj publikindaj rezultoj en la Esperanto-laboro aŭ pri ĝeneralaj problemoj de la Internacia Lingvo.
Eluzante ĉiujn mediojn kiel la partiaj gazetoj (de ĉiuj partioj) gazetoj de la entreprenoj, radiostacioj k. t. p. la celo estas, informadi la leganton (aŭ aŭskultanton) en serioza kaj objektiva maniero pri la plej diversaj aktivecoj kaj problemoj de Esperanto-movado.

Surbaze de tiu daŭra efikado de larĝaj kaj ĝeneralaj informoj oni povas de tempo al tempo (ekzemple antaŭ komenco de kursoj, prelegoj k. t. p.) transiri al la

4.2. Celkonscia varbado:

Nun ne estas bezone, klarigi kio estas Esperanto k. t. p., sed oni povas senpere alparoli la antaŭklerigitan kaj informitan publikon, kiu jam bone

konas la bazajn problemojn de Esperanto. Se nun ekzemple venas interesuloj al ia prelego oni povas supozi, ke ili ne venas pro supraĵa scivolemo sed pro serioza intereso pri la temo aŭ por vere studi la lingvon.

De ne subtaksenda signifo estas la

4.3. Individua varbado:

flanke de la esperantistoj – sur tiu kampo oni povas ankaŭ nuntempe atingi la plej grandajn sukcesojn sed ankaŭ la plej grandajn fiaskojn. Pri la rezulto ĉiam decidas la „kielo" de la varbado. La deviga antaŭkondiĉo en la varbado estas, ke la koncernaj homoj nepre havu solidajn kaj larĝajn sciojn por bonkvalita argumentado. Same oni severe priatentu, ke en la diversaj kampoj oni ĉiam uzu la ĝustajn metodojn kaj argumentojn – inter laboristoj necesas alimaniere argumenti ol inter universitataj profesoroj. Cetere – ne ĉiu povas ĉie varbi – kiu bone sukcesis je la universitata nivelo povus tute fiaski inter la laboristoj.

Ĉiuj menciitaj formoj kaj metodoj de informado kaj varbado estu kune – unu metodo ne povas anstataŭi la alian.

Ĉiam do validas – modernan homon oni nur povas interesigi por Esperanto per modernaj argumentoj kaj metodoj.

Esperantistaj familioj 8.-14. 7. 1979 en Hódmezövásárhely

En la kadro de la 2a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco okazis tiu pli-malpli sendependa renkontiĝo de familioj, en kiuj Esperanto estas uzata kaj la infanoj estas denaskaj esperantistoj. Entute 24 personoj el tri landoj estis la familianoj (13 plenkreskuloj, 11 geinfanoj), krome aliĝis kvin geinfanoj de aliaj esperantistoj, kiuj partoprenis la konferencon. Pliaj plenkreskuloj partoprenis nur 1 - 2 tagojn.

La plenkreskuloj ĉiutage partoprenis 4-horan seminarion. La prelegantoj plejparte estis la gepatroj mem, kaj estis laŭtlegataj ankaŭ tiuj kontribuaĵoj, kies verkintoj ne povis partopreni. Prelegis ankaŭ d-ro Bertalan Fekete, docento de la Pedagogia Altlernejo en Baja, fakulo pri la hungara-serbkroata kaj hungara-germana dulingveco en la minoritataj lernejoj. La sciencnivelan prelegaron verŝajne eldonos HEA. Jen la plej gravaj kontribuaĵoj:

- Dulingvismo, kiel socia fenomeno (d-ro Bertalan Fekete)
- Fenomeno de dulingvismo ĉe esperantistoj (Ernö Csiszár)
- Kelkaj rimarkoj al la dulingva edukado de denaskaj esperantistoj (d-ino Magda Šaturová)
- Limigoj ĉe denaska ekposedo de Esperanto (Aleš Bednařik)
- Supersegmentaj rimedoj de la lingvo Esperanto kaj la familia lingvo-uzo (d-ro Balázs Wacha)
- Lingva fizionomio de preskaŭ dujara esperantisto (József Hórváth)
- Observoj pri lingvo-uzo dum ludo (Ernö Csiszár)

Ĉe la infanoj 2 - 10 jaraj ĉiutage aliaj gepatroj deĵoris. Okazis komuna ludo, kantado, fabelrakontado, deklamlernado k. t. p. en la oportune establita ĉambro de la Pionirdomo, aŭ park-promenadoj. La interkompreniĝo en Esperanto efektiviĝis same kiel en iu ajn simila, sed nacilingva infangrupo. La infanoj tre bone fartis kaj ankaŭ post la komunaj programoj daŭris la interamikiĝoj, ludoj, tute sendepende de la nacieco.

Dum la spertinterŝanĝoj evidentiĝis la komunaj spertoj. Ekz. montriĝis nenia handikapaĵo ĉe la infanoj, malgraŭ la gepatroj spertis nur avanta-

Nova doktoriĝo pri interlingvistika temo

Dum la somero 1979 doktoriĝis Věra Barandovska el Opava/ČSSR per disertacio kun la temo „La rolo de la latina lingvo en la interlingvistiko“ (Úloha latiny v interlingvistice). La ducentpaĝa ĉeĥlingva laboro estas akceptita de la Filozofia Fakultato de la Universitato Purkyné en Brno. Ĝin ekspertizis la profesoroj d-ro A. Bartonêk (katedro de antikvaj lingvoj) kaj d-ro A. Lamprecht (katedro de kompara lingvistiko). La enhavo de la verko: *I. Sociologia aspekto de interlingvistiko, II. Loko de interlingvistiko en la lingvoscienco, III. Problemoj de tipologio de internaciaj lingvoj (IL), IV. Postuloj pri la ecoj de IL, V. Mallonga historio de IL, VI. Komenio kaj IL, VII. Internaciaj lingvoj bazitaj sur la latina, komparo de latindevenaj projektoj, VIII. Konkludoj — valoro de latina lingvo dum la konstruo de IL.*

Interlingvistoj interesitaj kontakti d-inon Barandovska pri la temo, skribu al ŝi (Věra Barandovska, Vančurova 55, 74 707 Opava 7). Jen ni prezentas la resumon de la disertacio de Věra Barandovska:

„Rolo de latina lingvo en interlingvistiko“

Unu el la plej aktualaj problemoj de la nuna epoko estas enkonduko de unu komuna internacia lingvo por la tuta mondo. Koncernan rolon intencas plenumadi lingvoj naciaj same kiel planitaj internaciaj lingvoj. Ĉar nur tiuj-ĉi lastaj sistemoj scipovas garantii neŭtralecon, ili estas preferendaj.

Flankenmetante la grupon de lingvoj aprioraj, kiuj malpraktikiĝis, oni direktu la atentemon al lingvoj aposterioraj. La plej granda parto de tiuj-ĉi projektoj eluzas iamaniere la lingvon latinan. Kiuj estas la kialoj? Latina lingvo estis dum jarcentoj vere internacia. Ĝis nun ĝi estas tia en certaj sciencaj kampoj. Sed praktike ĝi malfacile lerneblas de homoj meze klerigitaj. Vulgara formo de latina lingvo malaperis dum humanisma epoko kaj estiĝis fondo de lingvoj naciaj. Kiel kultura kaj civiliza faktoro ĝi forte efikis al aliaj lingvoj.

Novolatinaj projektoj havas du tendencojn:
1. simpligo de klasika latina lingvo (daŭrigo paĝo 61)

(resto de paĝo **59)**
ĝojn. En la antaŭlernejaj jaroj — sed almenaŭ en la unuaj tri vivojaroj — speciale grava estas la gvidprincipo „unu persono — unu lingvo“, kaj ĉe la dulingvuloj (1. patra aŭ patrina, 2. tiu de la cetera medio) kaj ĉe la trilingvuloj (1. patra, 2. patrina, 3. tiu de la cetera medio). Tio signifas, ke iu persono uzu ĉiam la saman lingvon interkompreniĝe kun la infano (sed ne gravas, kiun lingvon uzas interkompreniĝe kun aliaj personoj antaŭ la infano). Nur tiel oni povas garantii, ke en la infana menso klare distingiĝas la du aŭ tri lingvosistemoj, ne okazas lingvomiksado kaj konekse kun tiu psika difekto.

Aparte menciindas la meritoj de la loka organizantino de la 2a IMEK, Katalin Faragó, sen kies plurmonata laboro la renkontiĝo ne okazintus, kaj la meritoj de Ernö Csiszár (H-8100 Várpalota, Kulich 25), konstanta respondeculo de tiaj renkontiĝoj. Sugestojn pri la venontjara renkontiĝo kaj iun ajn informon pri la denaskuloj sendu al li.

Árpád Rátkai

2. uzo de Standard Average European, influita de latina lingvo. Rilate al la unua tendenco oni devas memorigi meritan laboron de Komenio kaj samtempe akcenti lian ideon uzi internacian lingvon kiel rimedon de firmado kaj konservado de mondpaco.

En la dua direkto meritplenan laboron faris IALA kaj poste soveta interlingvistika skolo. Ambaŭ interesiĝis pri plej sukcesaj naturalismaj projektoj, similantaj inter si mem. Oni serĉis plej bonan solvon baze de scienclingvistika taksado. La sovetaj sciencistoj prenas en konsidero ankaŭ aspektojn sociologiajn, politikajn kaj ekonomiajn.

La problemo de IL ne estas definitive solvita. La praktiko klare montris, ke dum konstruo de IL forte kunagis influo de latina lingvo, interrilate kun tuta eŭropa civilizo. Serĉante novajn vojojn, la lingvistoj ne rajtas preterlasi latinan lingvon, sed eluzi ĝian bazon aŭ dum konstruo de nova helplingvo, aŭ dum nura akcepto de jam ekzistanta internacia lingvo de latinida karaktero.“

Somera Esperanto-Universitato

Al la Somera Esperanto-Universitato en Gyula/Hungario 1979 vojaĝis 8 esperantistoj el GDR por pasigi en internacia medio la kulturajn tagojn de la mondfame konata Esperanto-Universitato. Ĝi okazis, jam la 17an fojon, de la 8a ĝis la 14a de julio. Ĉeestis ĉirkaŭ 130 partoprenintoj el 8 landoj.

La ĉiutagaj prelegoj estis interesaj kaj kontentigis ĉiujn. Ni aŭdis pri la rolo de Hungario en la mondo kaj pri la komenco de universitata instruado de la internacia lingvo en Hungario. D-ro Tyblewski (Pollando) parolis pri la personeco de esperantisto kaj Damjen Vahen Svetinov, verkisto (Jugoslavio) prezentis lumbildojn pri Jugoslavio-Slovenio. D-ino Clelia Conterno Guglielminetti (Italio) montris la folkloron inter verdo kaj neĝo en sia lando. Bernard Golden akompanis nin sur la spuroj de la prahomo en Hungario. Ne ĉiuj prelegoj ĉi-tie povas esti menciitaj, sed mi volas substreki, ke valoras vojaĝi al Gyula, por konatiĝi ankaŭ kun tiu-ĉi belega ĝardenurbo, kiu prave estas nomata la „verda urbo“. La loĝado estis agrabla. Oni povis elekti inter studenthejmo (1250 ft.) kaj hotelo (1800 ft.). La programo de SEU ne nur konsistis el prelegoj, sed ĝi inkluzivis ankaŭ du ekskursojn al Debrecen kaj al apudurbaj riveroj Körös. Krom tio la fortikaĵbanejo, konata pro la termalakvo, donis al ĉiu ĝojon kaj ripozon. La vetero permesis al ni plurajn vizitojn. SEU vokos ankaŭ en la jaro 1980. Eble troviĝos denove kelkaj kuraĝuloj, kiuj trapasos la lingvan ekzamenon. En 1979 du esperantistoj el GDR sukcesis.

Bärbel Kulisch

Litova Filio de ASE

La 30an de novembro 1979 en Vilnius okazis konferenco por fondi Litovan Filion de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Partoprenis 126 delegitoj el 26 urboj kaj vilaĝoj de Litovio, inter ili multaj instruistoj kaj gejunuloj (studentoj, lernantoj). Oni decidis fondi la filion. estis akceptita la statuto, elektita la estraro el 15 personoj kaj ĝia prezidio el 7 personoj. La prezidanto elektitis A.-L. Skŭpas (ĉefo de katedro en Vilniusa universitato, magistro de filologiaj sciencoj), vicprezidantoj A. Vaitilavicius kaj P. Jegorovas, respondeca sekretario V. Marcinkevicius. Dum la konferenco funkciis riĉa ekspozicio de libroj, vespere okazis gaja amika vespermanĝo kun dancoj.

A. V.

Kunlaboro kun bulgaraj esperantistoj

Ankaŭ kun bulgaraj esperantistoj la kunlaboro sur distrikta ebeno bone progresas. Antaŭ nelonge subskribis interkonsenton la reprezentantoj de la distriktaj estraroj el Potsdam kaj Ruse. Por stimuli similajn bonvenajn aktivecojn ankaŭ en aliaj distriktoj ni sube publikigas la tekston:

Interkonsento pri amikeco kaj kunlaboro inter la Distrikta Estraro de la Bulgara Esperantista Asocio en Ruse kaj la Distrikta Laborrondo Esperanto Potsdam en la Kulturligo de GDR

La Distrikta Estraro de la Bulgara Esperantista Asocio en Ruse kaj la Distrikta Laborrondo Esperanto Potsdam en la Kulturligo de GDR (en plua teksto nomitaj „Distriktaj Estraroj") decidas:

– sur la bazo de interkonsentoj, kiuj estis deciditaj okaze de la XIa Kongreso de Esperanto-organizaĵoj de Eŭropaj socialismaj landoj,
– sur la bazo de ekzistantaj amikecaj rilatoj inter la partnerurboj Ruse/Bulgario kaj Potsdam/GDR, kaj
– sur la bazo de amikecaj rilatoj inter la Distriktaj Estraroj
plue firmigi kaj disvastigi la kunlaboron inter la Distriktaj Estraroj.

La ĉefaj celoj de ĉi tiu interkonsento estu:

I. Per konvenaj aranĝoj subteni la batalon por paco, malstreĉiĝo kaj malarmado.
II. Pliprofundigi la amikecajn rilatojn inter niaj landoj kaj homoj.
III. Aktivigi la laboron de la distriktaj organizaĵoj.

Por realigi supre formulitajn celojn la Distriktaj-Estraroj decidas jenajn ĉefajn taskojn kaj fiksojn:

1. Organizi regulajn interkonsentojn inter la Distriktaj Estraroj por interŝanĝi spertojn pri la praktika apliko de la internacia lingvo Esperanto en servo de socio kaj distrikta Esperanto-movado.

2. Akceli aktivecojn servantaj al
   – la organizado de komunaj kulturaj aranĝoj kaj diversspecaj renkontiĝoj,
   – interŝanĝo de materialoj kaj informoj por la realigo de ĉi tiu interkonsento,
   – la aparta atento al la distrikta junulara movado.

3. Ambaŭ Distriktaj Estraroj decidas, ke la detaloj de la kunlaboro, unuopaj taskoj kaj formoj estos difinitaj en ĉiujaraj protokoloj.

4. Ambaŭ Distriktaj Estraroj interkonsentas, ke ĉiuj formoj de la kunlaboro devas sekvi la principon de la egaleco en la financaj procedoj.

5. La interkonsenton oni povas ŝanĝi aŭ kompletigi laŭ propono de unu Distrikta Estraro.

6. La interkonsento estos konigita en konvena formo al la membroj en teritorioj, en kiuj agas la Distriktaj Estraroj.

Potsdam, la 16a de junio 1979
Por DLR-Esp. Potsdam
subskr. Hanna Scheffs
(estrino)

Por BEA Ruse
subskr. Nedkov Nedev
(estro)

Canko Murgin

Raporto el Berlino

Al Kultur-Ligo de GDR danke pro la organizita Internacia Seminario pri „Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado", en Bad Saarow, apud Berlino, de la 18-a ĝis la 24-a de nov. 1979.

1. Pin-arbar' aroma
staras avangarde,
Schönefeld'a dromo
nin brakumas arde.

2. Bunta konferenco
Ostbahnhof-salone,
mastroj en komenco
gastoj — interkone.

3. Duoninsuleto
en huf-forma lago,
ripoz-doma preto —
svelta kiel sago.

4. La silento zumas,
zumas neaŭdeble —
en salono lumas
parolad-prelegoj.

5. Ĉiun temo-trion
sekvas la diskutoj —
oni solvas ion ...
flagras la disputoj.

6. Kaj Amika Rondo
venis al konkludo:
Vivu Pac-Estonto!
For milito-ludo!

„Bulgara Esperantisto"

Abonu la revuon „Bulgara Esperantisto" — organo de Bulgara Esperantista Asocio, unu el la plej malnovaj Esperanto-periodaĵoj en la mondo. Ĝi havigos al vi interesan kaj allogan legaĵon en Esperanto. Aparte grava: pere de ĝi vi havos abundajn informojn pri la vivo kaj agado de la esperantistoj en Bulgario — la lando, kie la Esperanto-movado tiel bonsukcese marŝas antaŭen. Kaj tio, kredeble, pliriĉigos viajn spertojn.

La revuo aperas ĉiumonate en formato 20 x 30 cm, ĉiu numero en 20 paĝoj, do por la tuta jaro 240 paĝoj. La abonprezo por GDR-anoj estas 15 markoj. La revuo estas abonebla ĉe Centra Laborrondo Esperanto, 108 Berlin, Charlottenstraße 60.

Tria LEA-renkontiĝo en Potsdam

Vere, oni ne povis elekti pli bonan lokon por la tria renkontiĝo de la iamaj membroj de la Germana Laborista Esperanto-Asocio, kiu okazis la 20an kaj 21an de marto 1980. Kie? Nu ĝuste en Potsdam-Cecilienhof, en la historia memorejo mem, kie Hitler-Germanio devis 1945 akcepti la senkondiĉan kapitulacon, kie Stalin, Rooseveld kaj Churchill subskribis la Potsdaman Konvencion kaj kie Truman donis la ordonon por ĵeti la atombombojn sur Hiroŝimon kaj Nagasaki. En tiu historia loko, en la jaro de la 35a datreveno de la liberigo de la germana popolo el sub la faŝisma potenco, 45 iamaj laboristaj esperantistoj pasigis sian jam tradician renkontiĝon, la trian. Vespere, la 20an, la veteranoj de nia movado rigardis lumbildprelegon pri Potsdam, komune kantis, interbabilis pri komune travivitaj ne ĉiam bonaj tempoj. La postan tagon okazis la oficiala programo. Post malfermo pere de la prezidanto de CLE, Rudolf Hahlbohm, salutis la renkontiĝon la sekretario de la Distrikta Estraro de KL, k-do Schubert kaj Hanna Scheffs, la prezidantino de la Distrikta Laborrondo Esperanto Potsdam. Sekvis parolado de Ludwig Schödl, lige-al la historia datreveno de la liberigo. D-ro Detlev Blanke enkondukis la temon „Laboristaj esperantistoj kontraŭ faŝismo", kio sekvigis interesan multflankan diskuton. Ĉiam denove surprizis la viglaj kaj valoraj rememoroj pri la iama batalo. Tre valoran enrigardon en la historion de la Laborista-Esperanto-Movado ankaŭ ebligis la filatela objekto de Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt. Per komuna vizito de la memorajo Cecilienhof finiĝis la renkontiĝo, kiu certe restos en la memoro de ĉiuj partoprenintoj. Iamaj membroj de GLEA, neinvititoj al tiu renkontiĝo, nepre sin turnu al CLE.

Honorinsigno de CLE

Dum la LEA-renkontiĝo meritplenaj iamaj LEA-anoj estis distingitaj per la Honorinsigno de CLE:

- Gerhard Böttcher
- Else Gruhle
- Friedel Greif
- Gerhard Raupach
- Albert Weinhold
- Alice Schödl
- Gertrud Esefeld
- Richard Herr
- Fritz Hoffmann
- Alfred Kraushaar
- Erich Ehmig

Information des Ungarischen Kulturzentrums

Nach anfänglichen technischen Schwierigkeiten werden ab Anfang Juni 1980 die bestellten Esperanto-Bücher ausgeliefert.
Es wird gebeten, an das Kulturzentrum nur in deutscher Sprache zu schreiben.

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne!

Pri bestoj: Serpento kaj elefanto

Foje elefanto renkontis serpenton. Ĝi ĝuste per granda peno deĵetas sian malnovan haŭton.

La elefanto demandas: „Serpento, kial vi tiom ofte ŝanĝas vian haŭton?“
„Por ke mi ne ricevu tiel dikan felon kiel vi“, estis la respondo.

La ŝafo

Ŝafo havas idon kaj alportas al ĝi diversajn bongustaĵojn.
„Jen, delikataj betoj por vi!“
La ŝafido mordedis sen plezuro la betojn kaj poste lasis ilin.
„Jen, belegaj pomoj por vi!“
La ŝafido flarsentis la fruktojn kaj deturnis sin.
La zorgema patrino pensas: Mi devas kun ĝi iri al kuracisto.
La kuracisto esploris la ŝafidon kaj venis al rezulto: „Al ĝi mankas nenio alia ol iom da tute normala fojno.“
„Kio?“, blekas la ŝafpatrino, „ĉe nia bonstato vi postulas, ke mi donu al mia infano simplan fojnon?“

Traktoro kaj ĉevalo

„Kiel vi difektas la vojon“, diras ĉevalo. „Tiaj vojsulkoj ne ekzistis dum mia tempo.“
„Rigardu la ŝarĝojn, kiujn mi devas transporti“, respondis la traktoro.
„Kion vi hodiaŭ transportas?“ volas scii la ĉevalo.
„Betonplatojn – por la vojo“, diris la traktoro.

Klarigoj

elefanto — Elefant;
serpento — Schlange;
deĵeti — abwerfen (de + ĵeti);
haŭto — Haut;
felo — Fell;
dika — dick;
ŝafo — Schaf;
ido — Nachkomme, Junges. Man kann aus Vor- oder Nachsilben mit Hilfe von Wortendungen neue, selbständige Wörter bilden: id — o.
alporti — herantragen, bringen (al + porti);
bongustaĵo — Leckerbissen (bon-gust-aĵ-o);
delikata — köstlich, fein, zart, lecker;
beto — Rübe;
mordi — beißen (mordeti = knabbern). Achtung! Nicht verwechseln mit murdi = morden oder morti = sterben;
pomo — Apfel;
flarsenti — beschnuppern (flari + senti), flari = riechen;
deturni — abwenden (de + turni);
esplori — untersuchen;
fojno — Heu;
bleki — blöken;
bonstato — Wohlstand (bona + stato), stato = Stand, Lage;
traktoro — Traktor;
difekti — beschädigen;
vojsulko — Wagenspur (vojo + sulko), sulko = Furche;
ŝarĝo — Last;
transporti — befördern;
betonplato — Betonplatte (betono + plato).

Fehlerberichtigung zum Taschenlehrbuch Esperanto

(1. Auflage, Leipzig 1978)

Seite	Zeile	statt	muß heißen
15	2 und 3		Deutsche Bezeichnung, Beispiel
19	Liste:	„Singular . . .“ vor	„Subjekt . . .“ einordnen
25	3	Oh	Oho
28	3	Sinjorino	Sinjorino
35	Zeichnung:	Vase ohne Blumen	Blumen hinzufügen
35	2 v. u.	2 — divano	2 — sofo
37	15	Strassfurt	Stassfurt
37	7 v. u.	izolita!![26]“	izolita[26]!!“
38	1	Vidindaĵo	Vidindaĵoj
43	5 v. u.	muzeo por	muzeo de
50	7	konsentus	konsentus
58	14	Ihnen herzlich	Ihnen herzlichst
64	7	malfruiĝi por	malfruiĝi al
65	9 v. u.	nun	nin
68	8 v. u.	1 — 20!	1. — 20.!
71	6/7	inte-ressieren	inter-essieren
72	17	Albas	Alba
77	2	Lust kaj siaj	Lust kaj liaj
95	12	Česká	Česká
96	4	Česka	Česká
99	4	amikino	amikinoj
104	5	Lust ĵus klarigas	Lust klarigas
105	18	Sed Sinjoro	Sed sinjoro
116	6 v. u.	interesis	interesigis
120	8/9 v. u.	Das Präfix . . . erfassen!	(streichen! Kein Ersatz!)
128	1 v. u.	esperantan	Esperantan
130	17	Stätzen	Sätzen
145	11 v. u.	Leningradanoj	leningradanoj
149	5 v. u.	esperantaj	Esperantaj
150	5 v. u.	ĉefurbo de . . . /4/	ĉefurbo de . . . /1/
152	9 v. u.	Gdánsk	Gdańsk
153	3	Kraus kaj sia	Kraus kun sia
154	18	esperantaj	Esperantaj
159	14	Esperantaj	Esperantistaj
165	2	Esperantista	esperantista
169	22	kolomboj	kolimboj
169	23	kolomboj	kolimboj
178	6	Iudoj	ludoj
179	5/6 v. u.	fortgehen, machen)	fortgehen machen)
183	8 v. u.	loĝoĉambro esti	loĝoĉambro / esti
183	6 v. u.	Ina	Ina/
185	18	proponi festi restoracio	proponi festi en restoracio
187	5	Moskvo	Moskva
187	18	48 000	47 000
189	2	Kraus kaj siaj	Kraus kaj ĝiaj
189	5	Kraus kaj sia	Kraus kaj ĝia
194	Zwischen „10 (6)“ und „10 (6)“ Trennungsstrich streichen		
194	14	S. O.	(streichen!)
195	21	sur pendilon	sur pendigilon
200	15 v. u.	Iendenz	Tendenz
213	1 v. u.	Iouristen	Touristen
217	12	verschreiben	sich verschreiben
218	1	Suffix	Präfix
222	9 v. u.	Suffix „—i“	Suffix „—i—“
222	3 v. u.	Suffix „—um“	Suffix „—um—“
260	15 v. u.	stemplen	stempeln

Eĉ tio okazis

Ebrieta

Pro ofendo Vicki Eulenstein (Florida) devas sin pravigi. Ĉeporde de koktelejo ŝi estis alparolinta sinjoron en uniformo „Voku por mi taksion!“ Indignite li respondis: „Mi ja ne estas pordisto, mi estas admiralo! „Kaj Vicki: „Nu bone, tiam do ŝipon!“

Miskompreno

Kiam laboristoj plibeligis la parkon „Heritage“ en Guelph (Kanado), ili trovis amason de formetaĵoj: putrintajn blokojn de cedra ligno, malnovan generatoron, ŝnurojn, tendotolaĵojn farbŝmiritajn, aŭtorisortojn ktp. Ĉion ili transportis al la rubaĵ-deponejo. Sed baldaŭ ekestis skandalo, ĉar artistoj ne plu trovis siajn skulpturajn ekspoziciaĵojn.

Ideala sinteno

En volumena publikaĵo svisa eksperto pri enmigradaj problemoj priskribis la sintenon postulatan de bona, edukita civitano. Interalie li ne pendigu lavaĵojn en la fenestron, ne senokupe vagadu ĉirkaŭ la stacidomo, uzu la strattransirejojn por piedirantoj, sur leteroj notu la korektajn poŝtajn kodnumerojn kaj — ne ŝtelu pomojn!

Krom tio ĉio en ordo

En juĝdebata protokolo de sveda ŝipara juĝejo pri aĭstrandiĝo en la Stokholmaj ŝeroj de la panama ŝipo „Baltic Star“ tekstas: 1. Unu el la du ĉefaj kaldronegoj de la vapormaŝino malfunkciis. 2. La stirilo nur malrapide estis movebla. 3. La kompaso estis malkorekte ĝustigita. 4. La kapitano troviĝis subferdeke. 5. La deĵoranta observanto faris kafopaŭzon. 6. La direktilisto angle donis malkorektan ordonon al la stiristo, kiu komprenas nur la grekan kaj estas surdeta.

Rubaĵpoŝtaĵoj

50 poŝtoficistoj de la japana urbo Osaka du tagojn trafosis rubaĵmonton. Ili serĉis poŝtsakon kun 1500 leteroj, kiun iu poŝtoficisto mallongan tempon lasis negardita sur la trotuaro, de kie ĝin erare kunprenis la rubaĵ-entrepreno. La plej grandan parton de la leteroj oni retrovis, estis pli poste asertite, sed necesas purigado de la sendaĵoj antaŭ enmanigado.

Ventokaptilo

Dum diservo en malofte uzata kapelo apud Hellsberg, GFR, ventoblovo fermis la pezan pordon, kiu estis malfermebla nur de ekstere. Pastro kaj vizitantoj de la preĝejo pro tio sonorigis la sonorilojn por alvoki helpon. Fine du hazarde pasantaj biciklistoj liberigis la enŝlositojn. En la vilaĝo oni estis mirigita pri la longa sonorigado, sed tamen ne taksis ĝin kiel helpvokon.

INFORMOJ EL EKSTERLANDO

Nova oficejo de UEA

UEA establis en Novjorko novan duan oficejon, kiu pleje servos al la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

La oficiala malfermo okazis en 1979-12-13, de UN, oportune por sia funkciado.

La oficial malfermo okazis en 1979-12-13, por kio reprezentantoj de neregistaraj organizoj kaj la UN-oficejo iĝis invititaj. Krome la nova oficejo akceptis du tagojn poste ankaŭ anojn de la 3 kursoj okazantaj en Novjorko. Dum tiuj akceptoj estis utiligata la fotoekspozicio pri la infana jaro, kiun la kongresanoj en Lucerno vidis.

Por superrigardi la funkciadon de la Novjorka Oficejo, fondiĝis Stir-komitato. Fondita estas ankaŭ la sistemo de „Amikaro de la UN-Placa Oficejo", — organizo, kiu estas malferma al ĉiuj simpatiantoj kaj subtenantoj de Esperanto, sendepende de tio, ĉu ili scias la lingvon aŭ ne.

A g a d o e n 1 9 7 9

Antaŭ ol la oficejo en Novjorko establiĝis, la laborgrupo tie faris signifajn laborojn sub la prezido de s-ro Tonkin, krom atingi, ke la sekretario de Ekosok de UN venu al la Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno.

En 1979-01 UEA aliĝis al la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Stato kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (mallonge ni nomu: Konferenco de UN-NROj). Tiun konferencon organizas NROj mem. Nia nova aliĝo estas aldona aktiveco al la ĝisnuna, kio estis ĉeestoj en diversaj aranĝajoj de Ekosok kaj OPI (Oficejo por Publika Informado) de UN.

La laborgrupo ekspedis la raporton pri la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Rejkjaviko en 1977 al ĉiuregistaraj delegitaroj ĉe la Unuiĝinta Naciaro. La ĉeftemo de tiu kongreso estis, kiel ni memoras „rajto de komunikado".

(Laŭ UN kaj ni, 16)

Tonkin denove en UN-Domo

Laŭ invito de la lingvistika klubo de UN, la prezidanto de UEA, d-ro H. Tonkin (profesoro de la Universitato de Pensilvanio), prelegis pri Esperanto kaj pri argumentoj por Esperanto, en la Domo de UN, en 1979-10-04. Tio estis la duafoja prelego por li (la unua okazis en 1978-04-04).

Ĉeestis la aranĝon ankaŭ d-ro R. Muller, sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, kiu diris dum la UK en 1979: „UN bezonas vin. La mondo bezonas vin."
Post la 1-hora prelego sekvis 2-hora demandado de ĉeestantoj (Ĉ. kvardeko). Intervenis i. a. s-ro Muller, parolante pri siaj bonaj spertoj, kiujn li havis dum la UK. Ĉar la membroj de la lingvistika klubo de UN estas grandparte oficistoj por lingvaj servoj, iliaj interesiĝoj pri Esperanto estis grandaj. Kvin el ili esprimis sian deziron lerni Esperanton.

(UN kaj ni, 16)

Ricevebla

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO, 4a kajero, estas ankoraŭ ricevebla kontraŭ esperantajoj el aliaj landoj. Se vi sendos valoran libron, vi ricevos konforman nombron de la 44-paĝa revuo. La adreso: Litova Societo de Amikeco, Esperanto sekcio, SU-232600 VILNIUS, Sovetunio.

Hobia revuo

„Kolektanto", hobia revuo de la sekcio de Esperantistoj-kolektantoj.
Ĝin eldonas Bulgara Esperantista Asocio. La adreso de la redakcio estas: Kolektanto, Bulgario - 1407 Sofia, Poŝtkesto 46. Aperas 4 kajeroj jare. Ĉiu kajero en minimume 20 paĝoj. Redaktas: M. Jordanov, M. Bacev, M. Ŝekerĝiev, R. Konstantinova.
La revuo estas abonebla dum la tuta jaro. Abono validas por kalendara jaro. Ĝi estas: por Bulgario - 1 levo, por socialismaj landoj - 2 rubloj.
Alilandanoj povas aboni Kolektanto'n jenmaniere:

1. Per siaj korespondantoj en Bulgario, jarabono - 2 levoj.
2. Per sendo de 10 internaciaj respondkuponoj (IRK).
3. Per la Libroservo de UEA. Jarabono - 7,50 guldenoj.

Ĉiu deziranto povas ricevi specimenan kajeron senpage.

Laktistoj internacie

En la jaro 1982 en urbo Soĉi (subtropika parto de Nigra-mara bordo en Sovetunio) okazos Internacia Kongreso de Laktistoj kaj laborantoj en lakta industrio. Interalie okazos vizito al urba Lakta kombinumo, kie estas grupo da esperantistoj.
Tial ni jam nun volas havi kontaktojn kun ĉiuj laktistoj de la mondo por pruvi utilecon de nia lingvo. (La eldono c prospekto pri la kombinumo ankaŭ en Esperanto dependos de viaj petoj.) Se vi iel rilatas al lakta industrio aŭ havas amikojn laborantaj tie (eĉ neesperantistoj, dume) skribu al ni. Ni bezonas viajn reehojn. La respondo certa. Nia adreso: Esperanto-grupo, str. Gorkogo 87, Moločnij kombinat, 354 000 Soĉi, Sovetunio.

INFORMOJ EL GDR

„Kiel parolis la Neander-val-ano?“

Sub tiu titolo la televido de GDR (1-a programo) emisiis vespere, la 26an de marto 1980, programon pri la ekesto de la homa lingvo. Post tiutema filmo kelkaj ekspertoj respondis demandojn de la aŭskultantoj. Interalie oni ankaŭ demandis, ĉu en la Unuiĝintaj Nacioj ne estus eble enkonduki iun internacian lingvon kaj kiel statas pri Esperanto. D-ro Viehweger de la Akademio de Sciencoj bedaŭrinde ne bone respondis la demandojn. Li faris jenajn erarojn:

1. Li malpravis dirante, ke dum ĉirkaŭ 100 jaroj oni okupiĝas pri mondaj helplingvoj. Kiel konate, almenaŭ dum 500 jaroj ekaperis plej diversaj projektoj de helplingvoj.

2. D-ro Viehweger nomis kiel „variantoj“ de helplingvo, krom Esperanto, ankaŭ Volapüko kaj Latino sine flexione. Estas eraro starigi ĉiujn tri sistemojn sur unu komunan bazon.

3. D-ro Viehweger esprimis sian „personan opinion“, kiel li substrekis kelkfoje dum la respondo. Sed li evidente ne konis le plej bazajn faktojn asertante, ke laŭ lia opinio Esperanto ne respondas al la „komunikadaj postuloj“ starigendaj al internacia komunikilo. Li citis la problemon de la faklingvo.

Oni tamen devas konstati, ke mankis la kutimaj asertoj, ke Esperanto kiel „artefarita lingvo“ ne povas funkcii k. t. p. Li ankaŭ ne ridindigis la lingvon. Sed tute evidenta estis lia neinformiteco.

Feliĉe lia opinio — kvankam ja influa pro la televida emisio — ne plu estas tipa por la lingvistoj de GDR, almenaŭ ne por tiuj, kiuj jam okupiĝas pri la problemo leginte la publikigitajn materialojn, kaj ilia nombro kreskas.

Mondnovaĵoj

Temas pri la scienc-fikcia romano „Homunkuli“ de Peter Lorenz, eldonita en 1978 de eldonejo Neues Leben Berlin. Rimarkinda estas ke la aŭtoro uzas (sed eĉ ne unu fojon mencias) Esperanton. Li uzas la valuton „Usonodollar“ (p. 8). Parte ni renkontas „mondnovaĵoj“ (p. 182, evidente mispresita „mondnovaĵoj“) kaj sur p. 234 sciiĝas ke tio estas novaĵagentejo.

Mi ne scias ĉu la aŭtoro estas esperantisto. Sed sendube estas atentinda fakto, ke li uzas E-ton kiel neniel klarigendan memkompreneblaĵon.

M. Lennartz

Wissenschaftliche Beiträge gesucht

Die Fachgruppe Interlinguistik/Esperantologie beabsichtigt, Interessenten aus der DDR Gelegenheit zu geben, auf einem Kolloquium über ihre interlinguistischen und esperantologischen Arbeiten zu informieren. Informationen über Beiträge nimmt der Zentrale Arbeitskreis entgegen.

Seminario pri metodiko

De la 12a ĝis 15a februaro 1980 en Miersdorf ĉe Zeuthen (Berlin) okazis seminario por kursgvidantoj. Partoprenis 18 personoj. La seminarion gvidis d-ro Till Dahlenburg.

Slovakaj gejunuloj en Dresden

Je fino de marto la dresdena E-klubo gastigis dum tri tagoj tridek infanojn (inter ili bonaj kantantoj kaj muzikantoj) el la urboj Zilina (ČSSR), Hoyerswerda kaj Meißen (GDR) laŭ la moto: Kiu havas la junularon, tiu havas la estonton.

(E. W.)

Ni kore gratulas

— al la internacie konata bulgara esperantisto, la esperantologo, lektoro kaj redaktoro, Kunĉo Valev, kiu festis fine de 1979 sian 60an naskiĝtagon

— al la konata bulgara tradukisto („Sub la jugo“ de Ivan Vazov) kaj Esperanto-poeto, Simeon M. Simeonov, kiu festis fine de 1979 sian 80an naskiĝtagon

— al Friedel Greif, iama laborista esperantistino el Leipzig, kiu fariĝis 70jara la 26an de marto 1980

— al Paul Köster el Rostock-Lüttenklein, kiu festis la 23. 3. 1980 sian 70-an naskiĝtagon

Ni funebras

— pro la forpaso de Walter von Waldowski, kiu mortis la 4an de marto 1980 en aĝo de 81 jaroj

— pro la morto de Paul Glöckner el Pirna, la 25an de decembro 1979

— pro Gerhard Schmidt el Mellenbach, kiu mortis la 1an de marto 1980

— pro Harry Dost el Karl-Marx-Stadt, kiu mortis la 11an de marto 1980

Bonvolu noti

La recenzo en „der esperantist“ 6/79 „Interesa nova libro“ (p. 21—22) estas verkita de Manfred Arnold el Berlin. Ni petas pardonon pro la nemencio.

La red.

RECENZOJ

„Eperantisto Slovaka“

Kion postulas aktiva kaj instruita esperantisto de revuo periode aperanta? Kvankam inklinoj kaj interesoj de la homoj estas treege malsamaj, tamen sendepende de tio atendas ĉiuj al progreso interesitaj esperantistoj unuavice informojn pri la disvolviĝo de la Esperanta movado sur naciaj kaj internaciaj ebenoj. Strebante al lingva perfektiĝado ili ŝatas trovi lingvajn instruojn, pritraktojn de subtilaj gramatikaĵoj. Plue ĝustatempaj indikoj rilate al internaciaj aranĝoj, seminarioj, feriumadaj ofertoj kaj aliaj estas necesaj. Ne devas manki literaturaĵoj en prozo kaj poemo. Finfine distra kaj amuza parto kompletiu la enhavon.

Al la tutaĵo de tiuj deziroj eĉ de pretendemaj legantoj respondas la ekde 1977 noveldonita organo de la Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko sub la nomo „Esperantisto Slovaka“. La tajppresita 12-paĝa grandformata periodaĵo ne nur spegulas la aktivecon de la slovaka esperantistaro, ne nur pritraktas ties sukcesojn kaj problemojn en la celkonscia por- kaj peresperanta laboro, sed informas ankaŭ detale, perhelpe de raportoj el la plej variaj eksterlandaj esperantistaj organizoj, pri la stato de la Esperanta movado en la koncernaj landoj.

Lerte kompilita lingva anguleto kun por gruplaboroj praktikaj konsiloj helpas plimultigi la lingvosciojn. Popolkantaj tekstoj kaj notoj, krucenigmoj en zorge proporciigita kvanto kaj kvalito agrabligas la legadon. Specialan mencion meritas la suplementa „Gaja Kajereto“, enhavanta ŝercojn kaj anekdotojn. Celante enkonduki Esperanton en la sferon de scienco kaj tekniko, informoj pri la tiurilate atingitaj sukcesoj valorigas aldone la gazeton.

Akorde kun la principoj de la Tutmonda Packonsilantaro kaj Mondpaca Esperantista Movado, ĉiu kajero atestas la noblan strebadon al forigo de militoj, nacia liberigo kaj egalrajteco, reciproka interkompreniĝo kaj paca kunvivado de ĉiuj nacioj.

Se la „Esperantisto Slovaka“ intensas prefere instigi al efika aktiveco, sendube la redakcio bonege solvis tiun taskon. Tiel altkvalita kaj multenhava publicaĵo ne bezonas specialan rekomendon. Ĉiu atentema leganto ĉiam denove mem enmanigas ĝin kaj tiras el ĉiu novaperanta kajero utilon por sia propra laboro.

Erich Würker

„Juna Amiko“

Ĉiujare multaj infanoj kaj gejunuloj lernas Esperanton. Por ke ili sentu ĝojon pri la akirita lingvoscio kaj por pliperfektiĝi ili bezonas facilan kaj interesan legaĵon en simplaj vortoj kaj frazoj. El tiu neceso rezultis la bona ideo eldoni revuon por gelernantoj kaj per ĝia helpo ligi ilin al la lingvo kaj la movado. „Juna Amiko“ aperis unuafoje en la jaro 1972. Ekde tiam sekvis ĉiujare tri numeroj, ĝis nun entute 16. Ili estas verkitaj en tre facila kaj klara lingvaĵo, kompreneblaj al ĉiu, kiu posedas bazajn lingvosciojn.

La enhavo de la revuo estas tre varia, kaj ĉiu leganto trovas en ĝi certe ion interesan, ekzemple diversajn rakontojn, artikolojn pri tekniko, sporto, historio, kulturo kaj aliaj temoj. Interesaj estas ĉiam la artikoloj, kiuj prezentas la unuopajn landojn. Ne mankas humuro, poemoj, ludoj, kantoj kaj enigmoj. Ĉion akompanas multaj bildoj.

Kvankam la revuo estas ĉefe destinita por 12—16 jaraj gelernantoj, ĉiu komencanto, ankaŭ plenkreskulo povas tre bone uzi ĝin por legado kaj lernado. Ĉiu numero enhavas sufiĉe da materialo por plivigligi la instruadon en grupoj kaj kursoj. Tial „Juna Amiko“ estas rekomendinda al ĉiu instruisto kaj kursgvidanto.

Certe oni trovas en la revuo ankaŭ ion kritikindan. Kelkaj rakontoj ŝajnas taŭgaj nur por legantoj pli junaj ol 12—16 jaraj. La pli aĝaj eble atendas aliajn kontribuaĵojn. Mankas rakontoj kun pli aventura enhavo, specialaj artikoloj por knabinoj ktp. Sed tio estas ankaŭ afero de la gelegantoj mem, kiuj povas influi la enhavon de sia revuo. La redakcio, kiu havas kunlaborantojn en multaj landoj, certe ĝojos pri ĉiu propono kaj kritiko, celantaj plibonigi la revuon.

Bedaŭrinde aperadas la revuo kun sufiĉe granda malfruiĝo, kaj estus bone, se ĝi povus aperi pli ofte en la jaro ol trifoje. Sed tio dependas ankaŭ de la nombro de abonantoj. Tial subtenu tiun ĉi bonan ideon kaj abonu „Junan Amikon“. Certe vi ne bedaŭros.

Dieter Berndt

RECENZOJ

Lajos Tárkony, De paĝo al paĝo; dua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1976; 120 p.

La lastatempe rimarkinda aktiveco de Hungara Esperanto-Asocio en la kampo de eldonado disponigis al la internacia esperantistaro i. a. la supre prezentitan libron. Ĝi entenas dek eseojn pri Esperanto-aŭtoroj, kiuj en la tempo de la unua eldono (1932) estis reprezentaj por la literatura vivo en Esperantio kaj multrilate avangardaj, nome pri Julio Baghy, Karlo Bodó, Hilda Dresen, Stellan Engholm, Jean Forge, Nikolao Hohlov, Kolomano Kalocsay, Raymond Schwartz, Kenelm Sturmer kaj Ferenc Szilágyj. En la eseoj la aŭtoro analizas en diversaj formoj (kelkfoje eĉ dialoge) reprezentajn verkojn (pleje poemojn, sed ankaŭ prozajojn) de la respektivaj verkistoj rilate la enhavon, la formon, la adekvatecon de formo kaj enhavo, la lingvan kaj poetikan lertecon ktp. La reeldono de tiuj eseoj estas ege salutinda ne nur pro tio, ke per ĝi kelkaj aŭtoroj preskaŭ nekonataj al la nuntempa generacio de esperantistoj estas savitaj de la forgeso (ekz. Bodó, Engholm, Sturmer), sed precipe pro ilia literaturkritikaj signifo kaj graveco, kiuj estas malfacile supertakseblaj. Ja je la unua fojo kritikisto okupiĝas pri Esperanto-literaturaĵoj sur nivelo samranga al la nivelo de nacilingva literaturkritiko. En sia antaŭparolo al la unua eldono la aŭtoro diris, ke li opinias la diletantismon en la Esperanto-literaturo malaktualiĝinta, ke la tempo en kiu oni praktikis pardoneman indulgon rilate al la literatura valoro de originala Esperanto-verko, forpasis kaj ke nur kritiko efektiganta sian kontrolan rolon per malfermitaj okuloj kaj sinceraj paroloj povas iĝi konstruanta faktoro. Kiel vere, kaj kiel bedaŭrinde, ke tiuj trafaj admonoj ne povis malhelpi la rean kaj rean aperon de la dirita pardonema indulgo en la literaturkritiko eĉ de niaj tagoj.

Do, la libro konservis sian aktualecon. Ĝi estas leginda tiel pro siaj sagacaj, trafaj analizoj kiel pro la klara, fluanobla lingvaĵo, kiu ankaŭ en kritikaj eldiroj estas neniam ofenda. Tiu lingvaĵo havigas al la leganto krom la enhava pliriĉigo veran ĝuon kaj faras la legadon pura plezuro. Ke la eseoj krome vekas la bezonon profundiĝi en la analizitajn (kvankam nun apenaŭ havigeblajn) literaturaĵojn, montras pli bone ol ĉio alia la ĝustecon kaj ĝustatempecon de ilia reeldono.

La bio-bibliografiaj notoj je la fino de la libro estas ĝisdatigitaj de Maria Benczik. Certe dezirindas, ke tia ĝisdatigo okazu ankaŭ rilate kritikan analizon pri la verkoj de la priparolitaj verkistoj.

Dr. Karl Schulze

Mondlingvo en infanlibro

La Eldonejo por infanlibroj en Berlin (Der Kinderbuchverlag Berlin) fine de 1978 eldonis tre interesan libreton de Gottfried Spies „Pro kio la homoj lernis paroli“ (Warum die Menschen sprechen lernten. Interessantes aus Geschichte und Gegenwart der Sprache).

Tiu 143paĝa libreto estas destinita por infanoj ekde 12 jaroj kaj estas popularscienca laŭ infana prezento de la multaj aspektoj de la homa lingvo kaj ties uzo. Vere tre utila interese skribita kaj bele ilustrita libreto, haviginda eĉ al plenkreskuloj. Sur paĝoj 108 — 116 ni trovas interesan ĉapitron „Universala lingvo por ĉiuj homoj?“. La aŭtoro starigas la demandon pri la ideo enkonduki internacian aŭ tuthoman lingvon, iom intermiksante ambaŭ distingendajn konceptojn. Ekskludante la eblecon, ke nacia lingvo havu tiu(j)n funkcio(j)n li diskutas, ĉu la homo ne povus mem „laŭmezure“ krei tian universalan lingvon. Atentigante pri la diversaj tiaspecaj provoj li iom pli detale kaj sufiĉe ĝustafakte prezentas Esperanton kiel funkciantan lingvon, kiu internacie havas certan disvastiĝon.

Kvankam Spies iom supraĵe kaj ne ĉiam tute ĝuste traktas la fenomenon de planlingvo (li ekzemple erarige ĉiam nur parolas pri „Universalsprache“), li tamen ĝenerale pentras sufiĉe realecan bildon. Evidente li klopodis, eble ne tute plensukcese, alproprigi al si bazajn faktojn pri Esperanto. Kaj fine ni ne forgesu, ke ĝi ne estas scienca sed porinfana libro.

Ĉe la fino de la ĉapitro (p. 116) li pridubas la ŝancon, ke etnolingvo aŭ artefarita tro baldaŭ povus fariĝi „universala lingvo de la tuta homaro“. Jes, vere, pri tio ne havas sencon spekulacii. Sed Spies forgesas la pli realan demandon de internacia lingvo, kaj tiu demando daŭre pligravigas. „Sed en ĉiuj landoj kreskadas la preteco serioze meditadi pri problemoj de internacia lingva interkompreniĝo kaj ĉi-rilate ankaŭ pri tiaj mondhelplingvoj. Por tio la pola okulisto d-ro Zamenhof donis tute gravan kontribuon“ (p. 116). Tiel konkludante Spies tute pravas. La valoro de la libreto por ni esperantistoj konsistas en tio, ke unuafoje en tre alloga maniero infanoj estas atentigataj pri la ekzisto de la mondlingva problemo.

D. B.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario

Stojan Ŝopov, P.K. 132, **7700 Târgoviŝte.** dez. kor. kun esperantistaj familioj el GDR

GDR

Susann Rekewitz, 2000 **Neubrandenburg,** Petrosawodsker Str. 57, (17j), dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm

2 komencantoj (19j.) dez. kor. p. ĉ. t. kun geamikoj prec. el Hungario, CSSR, Pollando:
— H. J. Babetzke, 2822 **Lübtheen,** Stellingstraße 1
— P. Timm, 2822 **Lübbendorf**

Instruistino por fremdaj lingvoj dez. kor. pri lingvoj kaj literaturo: Sabine Liesecke, **7033 Leipzig,** W.-Zipperer-Str. 41

Kuracisto dez. kor. pri turismo, kol. bk: D-ro Rudolf Grohser, **8900 Görlitz,** Biesnitzer Straße 45

Komencantoj dez. kor.:
— Gabriele Schoerner, **1200 Frankfurt/O.,** Wilhelm-Pieck-Straße 324
— Detlef Lindner, **1200 Frankfurt/O.,** Aurorahügel 6
— Gabriela Pohland, **1200 Frankfurt/O.,** Huttenstraße 1

Hungario

Instruisto por matematiko, 25j., dez. kor. kun gejunuloj el GDR pri literaturo, historio, muziko, lingvoj: Tomás Veizer, **9401 Sopron Bácsiút,** Pf. 0327

39j. ĝardenteknikisto dez. kor. pri mondkoncepto de Esperanto, turismo, muziko: Johano Mezey, **1222 Budapest,** Andra u. 9

Junulo, 20j., dez. kor. k. germanaj gejunuloj pri muziko, arto, historio: Johano Koncz, **H-2243 Koka,** Petöfi u. 4

Inĝeniero, 40j., prezidanto de la loka E-klubo, dez. kor. pri vojaĝoj, naturo, ekskursoj, kaj ankaŭ serĉas gekorespondantojn por siaj klubanoj: József Zónai, **H-6400 Kiskunhalas,** Allomás u. 2

Arkitekta teknikisto, 31j., dez. kor. pri vojaĝoj, malnova arkitekturo, moderna muziko, kol. diapozitivojn, gramofondiskojn: Gözö Gaál, **4031 Debrecen,** Kebnika's str. 6, part. 6

Kubo

Studento, 18j., dez. kor. k. geesperantistoj el GDR p. ĉ. t., kol. pm, bk, librojn revuojn: Alberto F. Calienes B., Edif. 11 apto. 19, E/21 y 22, Rpto. Bahía C. **Habana**

Soveta Unio

Inĝeniero, 29j., dez. kor. p. ĉ. t., precipe pri radioamatora tekniko, literaturo: Jurij Galutva, **332 608 Energodar,** Ukraina SSR, Stroitelej 24—47

Por kompilado de E-terminaroj mi serĉas diverslingvajn librojn k. vortarojn pri flagoj, blazonoj, tipografio, eldonaferoj. Bv. proponi al: Nikolaj Staroducev, a. k. 618m, **340 092 Doneck**

Pionirgvidantino, 22j., dez. kor. i. samaĝaj geesperantistoj el GDR, kol. bk. Nadia Kogemikova, **404 123 i. Volisskij,** 11 pr. o. 4, **kv. 24**

Knabo, 8j., dez. kor. kun samaĝuloj tutmonde, kol. pm, bk: Aleksej Andrejev, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Gogola 12–2

Knabino, 9j., dez. kor. p. ĉ. t., tutmonde, kol. bk: Oksana Ivanova, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Gogola 12–5

Galja Šarafutdinova, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Uljanovkoje ŝoseo 11–38, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, librojn (26j.)

Pensiulino dez. kor. p. ĉ. t.: Zinaida Fjodorovna Ponamarjov, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Engeljsa 55–24

Irina Ivanova, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Gogola 12–5, (15j.), dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk

Ljudmila Taŝlinceva, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Lokomobiljnaja 1–26, (24j.), dez. kor. p. ĉ. t.

Natali Aroloviĉ, **446 010 Sizranj,** Kujbiŝ. obl., Gogola 12–7, (26j.), dez. kor. kun Francio, Anglio, Aŭstrio, Nederlando, Svislando, Hispanio, kol. E-gm, E-pm, librojn

Lernanto, 17j., dez. havi korespondamikon en GDR: Gunars Januovskis, Latvio, Ventspiels, **Stacijas iela 8–1**

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 523